Aŭtor' beata de l' eon'

AUCTOR BEATE SÆCULI



3. Ĉi am', per kies pov' kaj art'
estiĝis astro, ter' kaj mar',
disrompas la katenojn de
pli frua kaj nuntempa kulp'.

4. Ne cedos for el Via kor'
la forto de ĉi tiu am'.
La gentoj ĉerpos el ĉi font'
la riĉan gracon de l' pardon'.

5. Nun, traborita de la lanc',
apertas la vundita kor',
por ke, per akvo kaj per sang'
lavitaj, puraj estu ni.

6. Al Vi, Jesuo, estu glor',
el kies kor' elfluas grac'.
Kaj al la Patro kaj Spirit'
adoro estu en etern'. Amen.

AUCTOR BEATE SÆCULI • M: Albrecht Kronenberger 2014 laŭ la gregoria originalo • latina T: nekonata verkinto, 18a jarcento • E: Albrecht Kronenberger 2014-07-28

Jen la versio de nGL 359:



3. Nun, traborita de la lanc',
apertas la vundita kor',
por ke, per akvo kaj per sang'
lavitaj, puraj estu ni.

4. Al Vi, Jesuo, estu glor',
el kies kor' elfluas grac'.
Kaj al la Patro kaj Spirit'
adoro estu en etern'.

O SELGER URGRUND ALLEN SEINS • nGL 359 • M: M: Nikolaus Herman 1551, ADORU 287 • E: Albrecht Kronenberger 2014-07-28